

Laŭokaza Novaĵletero.

Organo de la

Internacia
Komerca kaj Ekonomia
Fakgrupo.

[provizora sidejo ĉe :]

Hornisgrindestrasse 8,
7580 Bühl 16,
Okc.-Germanio.

NUMERO 15.

IKEF
★
1984

DECEMBRO, 1986.

Travivaĵo de nova "redaktoro"

Estimataj gekolegoj!

Jen mi staras antaŭ tasko nova por mi: redakti Laŭokazan Novaĵleteron n-ro 15, kaj pleniĝi 12 paĝojn. Neniam antaŭe mi faris tion. Helposercante mi pensas al Lawrence Mee, mia herediganto. Sed li ja okupiĝas pri stablo de nova vivo en la t.n. Tria Aĝo, kaj li certe havas aliajn zorgojn ol tia Novaĵletero.

Laŭokaza Novaĵletero estu miaopinie raportilo pri la agadoj de niaj membroj. Estas io raportinda? Ekde semajnoj mi atendas alfluon de leteroj de aktivaj membroj, kiuj volas raporti pri sukcesa agado por IKEF. Ŝajnas ne esti facila havi tujan sukceson en Esperantujo. Ni ja scias, ke oni bezonas persistemon kaj paciencon. Mi atendas kaj atendas. Nur malmultaj leteroj alvenas, ĉefe de Roland Rotsaert, kiu sukcesis kalkuli la spezojn de ĉi tiu jaro el nederlandaj guldenoj en belgajn frankojn, kaj kiu nun havas komputeron por moderne administri la kontotenadon kaj tenadon de la membrolisto. Brave, Roland!

Ankoraŭ ne sufiĉas la kolektita materialo por 12 paĝoj. Jen kia surprizo! Venas la poŝtisto kaj alportas du eseojn de s-ro Mee. Ili plenigas la ankoraŭ

blankajn kvar paĝojn. Ĉu vi ankaŭ kredas al telepatio, kiel mi?

Se vi ricevas ĉi tiun decembran LN-on kredeble nur meze de januaro, tio estas mia kulpo. Pro troŝarĝo per profesia laboro kaj, mi konfesas, pro iom da timo antaŭ la nekutima redaktado, mi prokrastis la kompiladon ĝis post kristnasko. Kaj la vojo de la malneto al Budapeŝto kaj la forsendo de la finita LN de tie al vi daŭras kelkajn tagojn. Espereble venontfoje mi faros tion pli bone.

Franz Josef Braun

BONAN NOVJARON,
Sanon kaj feliĉon,
Sukceson ĉe via ĉiutaga profesia laboro,
Ĝojon kaj progreson ĉe via agado por IKEF kaj Esperanto,
Kaj entute fruktodonan kunlaboron inter ni,
Tion deziras por 1987. al VI

via Pr-GS-Red

Interkonatiĝo

Ankaŭ ĉifoje ni povas plezure bonvenigi tri novajn membrojn:

- 52 D-ro Goldman, Thomas A., :
ekonomikisto
7008 Millwood Road,
Bethesda MD 20817 Usono
- 53 Herrmann, s-ro Michael,
bankoficisto
Ostlandstrasse 6, D 7231 Hardt
FR Germanio
- 54 König, s-ro Daniel,
ekonomika studento
Speyerer Str.80, D 6803
Edingen-Neckarhausen
FR Germanio

D-ro Goldman estas la eldonanto de la modela ĉiumonata periodaĵo "Ekonomia Bulteno pri Usono". Ĝi estas abonebla ĉe la Libroservo de UEA. Plie D-ro Goldman eldonas la INTERNACIAN REVUON PRI EKONOMIO KAJ KOMERCO. Kun s-roj Herrmann kaj König ni gajnis du junajn /kaj certe aktivajn/ membrojn.

Nova Dumviva Membro:

o2 Mee, s-ro Lawrence, estrarano kaj eksa Ĝenerala Sekretario.
Lia nova adreso estas:
Rosenveldstraat 13 B
NL 3025 RM Rotterdam

Gratulon kaj dankon al vi!

ADMINISTRADO

Italaj membroj povas pagi sian IKEF-kotizon al itala peranto D-ro Marco Picasso, via de Gasperi 7, 20057 Vedano al Lambro. Bankkonto: n-ro 777 W, ĉe Banca Popolare di Lecco,
Agenzia Vedano al Lambro
aŭ per sendo de poŝtmarkoj.

Laŭdo por la Ekonomikista Grupo de IEA

Kiel jam sciante, faris la Ekonomikista Grupo de la Hungara Esperanto-Asocio /IKEF-24/ la rutinan laboron por la lasta LN n-ro 14. Ili ricevis laŭdon de ĉiu flanko pro la rapideco kaj bonkvalito de sia laboro.

Temo de la lasta estrarkunsido /vidu LN n-ro 14, paĝo du/ estis klopodo pliampleksigi la kunlaboron kun niaj hungaraj membroj. Tial ĉi tiu LN n-ro 15 estas ne nur kopi sed eĉ retajpita en la nuna formo fare de ili. Evidentiĝas, ke la metodo decidita en Brugge funkcias. Eble tio permesas eĉ plian intensiĝon kun la hungaraj membroj en la estonteco.

INDENTECŜILDOJ

- 12 D-ro Gianfranco Polerani,
Viale G. Suzzani, 2
I 20162 Milano
Italio
- Konsilisto pri fiskaj kaj entreprenaj aferoj;
- spertoj en reviziado de firmaoj.
- 33 Paul Seesink
Lariksstraat 22
NL 3329 AK Dordrecht
telefono: int-a + 31 78 16 02 83
- ensemblisto /interna arkitekto/, publicisto;
- lingvaj eblecoj: nederlanda;
- kompetenteco: aranĝi, instali internon de loĝdomoj, butikoj, oficejoj kaj bankoj;
- specialiĝo: aranĝproponoj por memfarantoj;
- rilatoj: kun meblofabrikantoj, arkitektoj, ensemblistoj, projektaranĝistoj.
- specialaj servoj: verki artikolojn por nederland- kaj esperantlingvaj revuoj, i.a. por MONATO.

Ek al MONATO

Vi ja scias, ke ni deklaris la revuon MONATO /Internacia magazino sendependa por politiko, ekonomio kaj kulturo/ nia bazo, nia tribunon, nia katedro. Per tion ni plenigas la kampon ekonomio en ĝi. Tial ni ne bezonas propran - nepageblan - ekonomian revuon, plue ni helpas al MONATO kaj fine ni /la verkantoj/ ricevas honorarion pro nia verkado. Do ni kaptas tri muŝojn per unu sola bato.

En la novembra numero kaj ankaŭ en INTER-MONATO /informilo por kunlaborantoj/ la redaktoro Stefan Maul plendas denove pri malpliiginta nombro de abonantoj kaj kun tio ligitaj financaj problemoj. Unu kajero dum 1986 jam forfalis.

Tio estas tre malagrabra novaĵo. Miaopinie MONATO - intertempe 7-jara - estas unu el la plej valoraj kaj subtenendaj institucioj esperantistaj. Ni, la esperantistaro, aparte ni ekonomiistoj, faru ĉion por helpi al MONATO venki la krizon kaj zorgu por daŭra eldonado dum la jubilea jaro kaj poste.

Kiamaniere ni povas helpi?

1. Aboni MONATOn /se vi ankoraŭ ne faris/;
2. Verki artikolojn pri komerca, ekonomia, ekonomika temo por MONATO /Per la honorario vi povas pagi vian abonon/;
3. Hivigi al MONATO reklamanoncojn de firmaoj /Per la 15 % makleraĵo vi povas pagi vian abonon aŭ fari donacon al la IKEF-kaso/.

Vi vidas:

Per tia agado vi helpas al MONATO, al vi mem, al IKEF kaj entute al Esperanto. Pli bona kaj efika agado ne eblas. Ni ekonomiistoj pensu kaj agu efike! Al kio vi ankoraŭ atendas? E k a l M O N A T O!

FJB

Interŝanĝoj de ideoj

KIU FARAS KION ?

.....kaj kio sekvis.

Vi certe bone memoras la agadon de nia estrarano F.-X. Gilbert, Bar-le-Duc, Francio, per lia kreo de REPERTOIRE DES PRODUITS INDUSTRIEL DE LA MEUSE en kvar lingvoj kadre de la Komerca Ĉambro de Bar-le-Duc

Pri tio multaj laŭdaj reagoj kaj mencioj aperis en la gazetaro, eĉ pli multaj leteroj alvenis ĉe s-ro Gilbert. Li kolektis ilin en speciala "gazetdosiero". Jen la statistiko:

9 mencioj en francaj /francilingvaj/ gazetoj
/Ekzemple Le Monde: "La meuse se vend en espéranto", = La mozo vendas esperantlingve/

17 mencioj en franca kaj internacia Esperanto-gazetaro;

2 mencioj en radioelsendoj /Radio France kaj Radio Vieno/;

51 leteroj /22 el Francio, 29 el 14 aliaj landoj/.

Ĉu vi jam pripensis alskribi esperantlingve kelkajn mozajn entreprenojn listigitajn en "Kiu faras kion", por ke ili eksciu, ke Esperanto efektive vivas kaj praktikeblas ankaŭ en komerco?

FJB

Interŝanĝo de ideoj - Terminologia laboro

Amplekse la LN n-ro 14 raportis sur paĝoj tri kaj kvin ĝis sep pri terminologia laboro. Intertempe via Prezidanto mem faris unuan provon. Li prenis la menciitan ŝlosilvortan ICC-terminaron

5-lingvan kaj provis traduki kelkajn paĝojn esperanten. Apudpaĝe vi trovas kopion de paĝoj 20/21 el la ICCE-terminaro kun tia provo.

Entute mi provtradukis kvin duoblajn paĝojn kaj sendis ilin al la aliaj estraranoj. Pri la resendotaj komentoj kaj amendo de la alskribitoj mi faros resumon.

Vin, karaj gelegantoj, mi invitas "kunludi". Volonte mi havus ankaŭ vian opinion pri miaj "tradukprovoj" sur paĝoj 20/21. Mi intencas prezenti la resumon pri la respondoj pri tiuj nocioj 6o ĝis 7oh sur paĝoj 20/21 en LN n-ro 16. Do bonvolu sendi al mi vian opinion ĝis la 10 de februaro 1987!

Mi opinias la tradukon de la ICC-ĝlosilvortaro ebla en relative mallonga tempo, se kelkaj lertaj esperantistoj el diversaj nacilingvoj senprokraste komencas.

Cetere nia membro YAMASAKI Seikō /IKEF-43/ skribis en sia letero de 1986-10-19: /mi citas laŭvorte/

"Estimataj sinjoroj,

Ĉe la kunsido en Pekino mi esprimis mian opinion pri la du sekvaj punktoj, kiujn mi ankoraŭ nun pensas esti esencaj:

1. Malkoncentri la malgrandan forton de la esperantistoj estas plej evitende. Kiam mi unue legis pri la fondo de la grupo, mi tuj pensis, kio estas ĝia rilato kun la Revuo de profesoro Goldman. Estis trankvilige, ke profesoro Goldman /IKEF-52, la redaktoro/ ĉeestis la kunsidon en Pekino kaj ke la prezidantaro deklaris, ke la grupo ne intencas iniciati novan fakan revuon, lasante la rolon al la magazino MONATO. Mi pensas, ke la grupanoj de IKEF kontribuu al la Goldman-

revuo artikolojn pli detalajn ol estas adekvataj por MONATO.

2. Ankaŭ por ne malkoncentri nian energion, la grupo devas ne komenci kompili novan ekonomian terminar-libron, sed uzi la jam ekzistantan vortaron de Munniksma kiel la bazon, kontribuante al la kompilado de ĝia suplemento. Estas necese akordiĝi kun ĉiuj koncernatoj pri evitado de duobliĝo de klopodoj kaj pri koncentrado de tiuj: ekzemple, fikso de adreso al kiu oni sendu proponojn de aldono kaj revizio aŭ de formato de slipoj. Fari ĝin pli ol naŭ-lingva ne estas praktike. Versioj en aliaj lingvoj, ekzemple en la japana, estus pli bone kompilita aparte en partoj E-japana kaj japana-E, aŭ grupigante kelkajn malmultajn parencajn lingvojn, ekzemple la ĉinan, la korean kaj la japanan havantaj komune la ĉinajn literojn.

Ĉi-kune enfermita por via informo estas mia artikolo pri ekonomiaj terminoj, aperinta en la raportaro de la ĉi-printempaj naciaj seminarioj /kunloĝado/ de esperantistoj.

Sincere via Y.S."

Komento de la redaktoro:

Pri 1.:

Mi konsentas kun s-ro Yamasaki. La t.n. "Goldman-revuo" estas la INTERNACIA REVUO PRI EKONOMIO KAJ KOMERCO, red. d-ro Thomas A. Goldman /IKEF-52/, eldonejo Interfakto, Vaŝingtono. Ĝi taŭgas precipe por longaj kaj detalaj ekonomi/k/aj eseoj. Eble d-ro Goldman povas fari mallongan kontribuon pri sia revuo en la venonta LN n-ro 16.

Pri 2.:

Kiam s-ro Yamasaki skribis sian leteron, li ankoraŭ ne havis en siaj manoj LN n-ro 14, en kiu la decido de la IKEF-estraro por certa procedo pri terminologia laboro estas pri-skribita /malfavore al Munniksma-vortaro pro tro altaj kostoj/. En sia aldonita artikolo pri ekonomiaj terminoj pravis s-ro Yamasaki, ke li estas spertulo sur tiu kampo. Mi esperas tial, ke li pretas kunlabori

en terminologia laboro, kvankam ni ne prenos la Munniksma-vortaron kiel bazon, sed uzos la kvinlingvan ICC-terminaron kaj la naŭlingvan terminaron de la

Eŭropa Komunumo. Se li ĉe tiu tuj volas prepari suplementon pri la japana kaj aliaj lingvoj, neniu kontraŭas.

F. J. B.

FOKUSO

FOKUSO estas nova kvaron-jara popular-sciencia periodaĵo de Hungara Esperanto-Asocio. Ĝi prezentas diversajn aktualajn temojn en stilo komprenebla eĉ por ne-fakuloj pri la koncerna temo.

La unua, 76-paĝa (formato 22 cm X 15,5 cm) numero de FOKUSO enhavas artikolojn interalie pri mikroelektroniko kaj mikrokomputiloj, sciencaj parkoj, psikiatrio. La dua numero - nun pretiĝanta - enhavos artikolojn pri robotoj, pri kancer-esploro, pri alternativaj eduk-sistemoj, vivo de bestoj, nekutima fizika fenomeno ktp.

Kial ni konatigas tiun ĉi revuon en nia Laŭokaza Novaĵletero? Ekzistas por tio almenaŭ du gravaj kaŭzoj.

Unue, pri FOKUSO zorgas la Ekonomikista Grupo de Hungara Esperanto-Asocio kune kun la Komputista Grupo de HEA. Tiuj du grupoj respondecas praktike pri la tuta enhavo de la periodaĵo kaj ankaŭ pri ties financa stato. Tio signifas, ke FOKUSO povas kaj povos ekzisti nur tiam, se la menciitaj grupoj certigos sufiĉe da enspezo (per pagitaj anoncoj, abonoj ktp. - kaj eble per alitipaj ekonomiaj agadoj profitdonaj, sed ne rilatantaj rekte al la eldonado de FOKUSO). Do la eldonado de FOKUSO prezentas ekzemplon - espereble sukcesan - de ekonomia agado per kaj por Esperanto. Kaj tiu agado estas farata grandparte de la anoj de IKEF (IKEF-24)!

Due, FOKUSO regule enhavos rubrikon pri ekonomiko. Pri tiu rubriko zorgas la sekretario de la Ekonomikista Grupo de HEA, Horváth József. En la unua numero de FOKUSO aperis artikolo de kunlaborantino de la budapeŝta Ekonomika Esplor-instituto pri la kaŝita ekonomio. En la artikolo la aŭtorino prezentas la diversajn

(ofte tute kontraŭajn) opiniojn, kiujn la fakuloj esprimas pri la "ne-videblaj" (ne-registritaj) enspezoj de la loĝantaro. Tie ĉi ne estas loko por konatigi la tutan artikolon, tial ni citos nur la konkludon de la aŭtorino: "... nepras necesas utiligi la kapablojn kaj entreprenemon de la homoj agadantaj en la kaŝita ekonomio, kiam ilia laboro kontentigas verajn bezonojn de la socio. Tiucele necesas videbligi la nevideblajn enspezojn per ekonomiaj rimedoj."

La dua numero de FOKUSO enhavos artikolon de Horváth József pri la internacia ŝuldokrizo - el specifa vidpunkto. Nome, la studoj pri la internacia ŝuldokrizo ĝenerale emfazas tion, kiajn problemojn kaŭzas la amortizo kaj pago de interezoj por la ŝuldantaj landoj. Sed la aŭtoro de tiu ĉi artikolo venis al nestendite konkludo dum siaj esploroj: la amortizado de pruntoj kaj pago de interezoj povas havi ege malagrablajn konsekvencojn ankaŭ por la kreditintaj landoj!

Alia artikolo en la sama numero prezentos la kriteriojn por esti pleje sukcesaj en la ekonomia agado surbaze de usona ekonomika libro ĝi montras, kion foras en la praktiko la plej elstaraj entreprenoj de la mondo. Multaj el la konkludoj estas certe pripensendaj ankaŭ rilate al nia Esperanta agado!

En la tria numero de FOKUSO estas planate aperigi artikolon pri "intreprenado" (entreprenado ene de entreprenoj) kaj aliaj ekonomiaj temoj.

FOKUSO regule aperigos informojn ankaŭ pri la agado de IKEF.

Se vi deziras ricevi senpagan provexempleron de FOKUSO, bonvolu skribi al la Ekonomikista Grupo de Hungara Esperanto-Asocio (Budapest, Pf. 193., H-1368).

Pri aboneblecoj vi trovas informon sur la spuda paĝo.

ENGLISH	ESPERANTO	DEUTSCH	ESPAÑOL	FRANÇAIS	ITALIANO
60 action a/action for cancellation	plendo nuligplendo	Klage a/Anfechtungs- klage, Aufhebungskla- ge	acción a/recurso de anulación	action a/recours en annulation	azione a/azione di annullamento, impugnativa
b/action for damages	plendo je damaĝokom- penso	b/Schadensersatz- klage	b/acción en reclamación de daños y prejuicios	b/action en dommages et intérêts	b/azione per danni
61 actuals 62 actuary	realaj nombroj aktuario	Istzahlen Versicherungs- mathematiker	cifras reales actuario	chiffres réels actuaire	cifre effettive attuario esperto in materia attu- ariaio
63 ad valorem /according to value/ 64 addendum	laŭvalore suplementa al- donajo	Ad Valorem Anhang, Nachtrag	ad valorem /sobre el va- lor/ cláusula adi- cional	ad valorem avenant, cla- use addition- nelle	ad valorem supplemento, clausola aggiun- tiva
65 adresse 66 adjuster	adresato eksperto	Empfänger Sachverständiger, Dispacheur	destinatario perito/seguro/	destinataire expert/ass./	destinatario liquidatore/ass./
67 admission a/a..of liabili- ty	konfeso responskonfeso	Anerkenntnis a/Haftungsaner- kenntnis	Reconocimiento a/reconocimi- ento de res- ponsabilidad	reconnaissance a/reconnaissance de respon- sabilité	ammissione a/a..di respon- sabilità
68 admitted	aprobita	Anerkannt, zuge- standen	acuerdo	agrée	autorizzato, concordato
69 advance/of money/ 70 advertising a/advertisement	parta antaŭpago reklamo reklamano	Vorschuss Anzeige, Werbung a/Annonce, Anzei- ge	adelanto, anti- cipo/de efecti- vo/ publicidad a/anuncio, pub- licidad, pro- paganda b/campaña publicitaria	avance/d'ar- gent/ publicité a/réclame, an- nonce, publi- cité b/campagne publicitaire intensive et de courte durée	anticipo publicità a/annuncio b/campagna publicitaria intensiva e di breve durata
b/a..blitz	intensa reklamo	b/Intensivwerbung			

c/a..campaign	c/varbokampanjo	c/Werbeaktion	c/campaña publicitaria	c/campagne publicitaire	c/campagna publicitaria
d/a..claim	d/slogano	c/Werbeargument	d/argumento publicitario	d/argument publicitaire	d/slogan
e/a..spot	e/reklamfilmo	e/Werbekurzfilm, Werbespot	e/film publici- tario	e/film publi- citaire	e/film publici- tario
f/burst a..	f/malsukcesa varbado	f/misslungene Werbung	f/matracca pub- licitaria	f/matraqnage publicitaire	f/boom publici- tario
g/hard a...	g/agresa reklamo	g/aggressive Werbung	g/publicidad agresiva	g/publicité agressive	g/p..aggressiva
h/heavy a..	h/masiva varbado	h/Massivwerbung	h/publicidad masiva	h/publicité massive, intensive	h/p..massiccia/ intensiva

FOKUSO '87

La eldonserio mendeblas dum la tuta jaro ĉe la subaj adresoj (paranteze la prezo por kvar volumoj - unu jarkolekto - en nacia valuto):

AFRIKO: Malagasio (5500 FMG): UKS, 101-ANTANA- NARIYO, B.P. 1663 * Niĝerio (8 nairoj): Godwin OSOH, Ekspoma Universitato, ILLEH, P.O.B. 62. * Suda-Afrika (12 randoj): Colin BECKFORD, P.O.B. 1227, 9000 CAPE TOWN, tel.: 77-0588 (hejma) k 22-6133 (laboreja)	AZIO: Brazilo (3000 sekeli): SCHLOSSER Tibor, IL-76243 REHOVOT Benjamin 18/B tel.: (054) 52553 * Ĉinio (5 juanoj): WU Liang Qi, Jiangsu, WUXI, Xue Qian - 152, hejma telefono: 26 123 * Japanio (2000 jenoj): SIBAJAMA Jun-ĉi, YOKO- HAMA 245 Nise-tyo 70-17-215 Totuka-ku, hejma tel.: (45) 812-4048 * Koreio (7000 uonoj): KEA, SON Ho-Chol, P.O.Box. 4258, SEOUL-100, tel.: ĉe KEA: 734-6222, ĉe laborejo: 295-5091-3
AMERIKO: Brazilo (14 int. respondkuponoj): BEL, Praça da República 54-2*, BR-20211 Rio de Janeiro, tel.: (021) 232-6309 * Kanado (10 dolaroj): Rudiger EICHHOLZ, Belleboro PETERBOROUGH KOL IBC R.R.1, tel.: (705) 939-8088 * Kubo (8 pesoj): Andrés RODRIGUEZ, HABANA via Blanca 311, caja 3, tel.: (81) 0576 * Usono (10 dolaroj) ELNA, CA 94530 EL CERRITO P.O.Box 1129. * Venezuelo (100 bolivaroj): Heber NIETO, Apartado 15250, MARACAIBO, Edo Zulia	EUROPO: Aŭstrio (150 ŝilingoj): Leopold PATEK, A-1090 WIEN Spittelauer Lande 19/21/B/5/18, hejma tel.: (0222) 34-79-412 * Belgio (380 BF): SONORILLO, B-2610 WILRIJK (ANTWERPEN) Doornstraat 22, tel.: (03) 827-24-05, Pk. 000-0152140-44 * Antono MECHELYNCK, B-1160 BRUXELLES Park van Woluweaan 46, tel.: (2) 672-58-90 (hej- ma) k (2) 521-32-16 (laboreja), Pk. 000- 0083327-80 * Britio (5 pundoj): BEA, LONDON W11 4UF 140 Holland Park Avenue, tel.: (01) 727-7821 * Armar SLY, 200 Nevills Rd, LETCH- WORTH, SG6 4TZ * Bulgario (8 levaj): Todor DIMITROV, BG-5000 VELIKO TARNOVO N, P.kolo 11, tel.: 22-347 (hejma) k 2651/227 (ofica), * Ĉeĥoslovakio (80 kronoj): E-klubo Dom odborov, CS-01-001 ZILINA Leninplaco * Danlando (80 kronoj): Soren ANDRESSEN, DK-7540 HADERUP
Aŭstralazio Aŭstralio (10 dolaroj): S-ino S. M. BURKITT, 20 Drummond Street, PARRA MATA NSW 2150	FRANCO: Vivevoj 1, tel.: (7) 45-22-45, Pk. 5412692 * Fran- cio (70 F): UFE, F-75004 PARIS 4 bis rue de la Cecilia, tel.: (1) 278-68-86, Pk. Paris 855 35 0 * Finnlando (45 markoj): Libra Mendoservo E.a., SF-05510 HYVINKAA 51, Kivistontia, tel.: (358) (914) 80 054, pk. 1247 90-1. Federacia Respub- liko Germanio (22 markoj): E-centro, D-4790 PADERBORN Pf. 1450, tel.: (49) (5251) 27612, Pk. 259658-301 * GDR (24 markoj): Michael BEHR, Koburger Str. 83, DDR-7113 MARKKLEE- BERG, Pk. 8499-54-36851 * Hispanio (1300 ESP): Miguel GUTIERREZ ADURIZ, Floranes 57- 2°C, SANTANDER, tel.: (192) 236 067 (hejma) * Hungario (individuoj): 100, institucioj: 400 HUF: Komputista Grupo de HEA, H-1368 BUDAPEST Pf. 193. * Irlando (7 IRL): Joy DAVIES, DUB- LIN 12 9 Tempus Wood * Islando (250 kro- noj): Hallgrímur SAMUNDSON, 210 GARÐABAR Co- datur 10, tel.: (1) 42810 * Italio (12000 lirej): Nina VESSELLA, I-04100 LATINA, via Pontina, Coop. Dacia E/13, Postgirkonto: 11516036 * dr. Pier- Luigi SIMARI, viale Druso 20, I-39100 BOLZANO, lab.tel.: (471) 43035/43034 * Jugoslavio (700 dina- roj): IKS, YU-41 000 ZAGREB Amrujeva 5, tel.: (41) 424-660 * Katalunio (1300 ESP): KEA, Apartat 482, E-43080 MARACAIBO
LUKSEMBURGO: Jagoda GREGER, PL-B1862 SOPOT str. Mazo- wiecka 17, B/II * Portugalio (1200 PTE): PEA, Rue Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500 Lisboa, tel.: (19) 714 13 59 * Rumanio (80 lejoi): * Sovetunio (8 rubloj): JEK FENIKSO, SU-226050 RIGA Pk. 150. * V. N. IVANOV, SU-153 022 IVANOVO, ul. Talkentskaja 60-36 * Svedio (60 kronoj): SEF, Eldona Societo B. 7502, S-20042 MALMO * Niklas GUSTAFSSON, S-115-41 STOCKHOLM Öregrundsg. 11: 683, E-SKOLAN, S-111 23 STOCKHOLM, Barnhuspaten 8. * Svi- tando (18 frankoj): Otto WALTER, Esperanto- weg, CH-8590 Romanshorn, tel.: (71) 63-26-04, Pk.: 80-12139	ĈIUJ LANDOJ: Nederlando (24 guldenoj): UEA, NL-3015 BJ ROTTERDAM Nieuwe Binnenweg 176

Okazaj informeroj.

Metodoj de akirado de varoj,
materialoj kaj havaĵoj de
ĉiuj tipoj.

Certe ne necesas klarigi, ke ni tie ĉi ne pensas pri akirado per ŝtelado, nek per trovado de trezoro dum promenado en la kamparo, nek eĉ per preno de rikolto post plantado kaj kreskigado de vegetaĵoj, aŭ simile. La nuna temo estas akirado de komercaĵoj en la normala maniero, kiu estas libervola transdono de propeco aŭ posedrajto de unu partio al alia post interkonsento.

Kazoj de simpla aĉeto.

Utilas pensi unue pri tre simpla okazaĵo, ekzemple pri akirado de gramofondisko laŭ propra elekto. Oni vizitas taŭgan butikon kaj elektas la sopiratan diskon el la multaj proponitaj. Oni notas la indikon de la butikestro pri la prezo je kiu ŝili pretas transdoni posedrajton de tiu disko. Oni proponas tian prezon; la butikestro ĝin akceptas, kaj la transdono estas facile farita, la aĉetanto ricevante krom la varo kvitancon pro ricevo de la interkonsentita sumo.

Tia traktaĵo estas kazo de vendo kaj aĉeto. Sed kvankam ĝi estas tre simpla, ĉiutaga kazo, notinde estas, ke en ĝi troviĝas ĉiuj klasikaj ecoj de komercaj traktaĵoj ĝenerale. La unua fazo estas negocado, (en la ĵusa ekzemplo, la butikestro videbligas la gamon de elektoj kaj prezoj, kaj la aĉetanto taksas la valoron al si de ŝatata komponaĵo kompare kun la necesa fordone de pene akirita mono); sekvas propono flanke de la aĉetanto de oportuna prezo, kun tuja akcepto flanke de la butikestro; propr-eco de la varo estas transdonata, akompanata de skriba atesto de tiu transdono en la formo de kvitanco.

Ne necesas, en tiuj kazoj, subskribi formalan kontrakton, sed tamen tia kontrakto ekzistis

dum tiuj kelkaj momentoj; simile kiel en pli formalaj kazoj, la kontrakto ĉesas ekzisti tuj kiam la celo estas plenumita, tio estas, je transdono de la posedrajto.

Kazoj kun formala kontrakto.

Tia trajto de transdono de posedrajto, (aŭ propeco), estas la plej ofte spertita kialo malantaŭ subskribo de formala kontrakto, krom en kazoj de engaĝo de artisto, deklamisto aŭ simile praktiki sian arton, aŭ de transdono de risko per asekurado.

La tri klasikaj ecoj de kontrakto, al kiuj ni jam aludis, estas: propono; akcepto, kaj priskribo de la kontraŭpresto. Kun ili devas esti interkonsento pri la metodo en kiu la kontrakto estingiĝos, kvankam plej ofte tio ne estas aparte priskribita ĉar subkomprenata el la aliaj priskriboj. La kontraŭpresto normale estas transpago de monsumo, kaj kutime la kontrakto priskribas la manieron en kiu ĝi okazos.

Formaleco de transdono de propeco estas signita per skriba deklaro en iu formo. La plej ofta formo estas tiu de fakturo, (aŭ de kvitanco en la simplaj kazoj). La fakturo enhavas priskribon de la (interkonsentita) prezo, kaj do servas ankaŭ kiel pagopetilo, sed gravas kompreni, ke la ĉefa eco de fakturo estas atesti pri transdono de propeco. Estingo de la kontrakto postulas plenumon de la kontraŭpresto, sed tiu ago, en si mem, ne tuŝas la temon de propeco.

Kazoj de profesiaj servoj.

Ĉar la valoro de fakturo estas atesti pri posedrajto, la uzado de fakturo ne taŭgas en tiuj aliaj kazoj de kontrakto, kiuj ne rilatas al posedrajto. Kiam temas pri profesiaj servoj, ekzemple de kuracisto, advokato, artisto aŭ restoraciestro, atesto pri transdono de posedrajto ne necesas, kvankam pagopetilo estas bezonata. En tiaj kazoj, ni sekvu la ekzemplon de Zamenhof kaj nomu ĝin, kalkulo. Sed mal-

IDENTECSILDO

03 Roland Rotsaert

Visspanstraat 97
B 8000 Brugge
Belgio
Telefona: +32 50 330004
/prefere je lundo aŭ
vespere/

- Komerca konsilisto, eks-bank-
oficisto;
- lingvaj eblecoj: nederlanda,
angla, franca, hispana;
- kompetenteco: Konsilas al etaj
entreprenejoj pri enlanda kaj
internacia komerco, finan-
cado, enkasigo; prizorgas
tiurilatan administradon;
preparo kaj kontrolo de
dokumentaj kreditoj, traduko
de komercaj tekstoj, tajpado
kun tekstoprilaborilo;
- specialaj servoj: pretas esti
peranto, sed mem ne vendas
nek aĉetas.

daŭrigo Identecsiltoj

35 Sotir Taleski

ul. "Oslo" br. 12
YU 91000 Skopje
Jugoslavio

- referanto pri eksporto kaj
importo de agrikulturaj pro-
duktaĵoj
- lingvaj eblecoj: serbokroata,
angla;
- kompetenteco: Interkonsentado
por eksporto kaj importo;
- eksportaj deziroj-eblecoj:
legomoj kaj fruktoj, semgrajno,
viando kaj viandaj produktoj,
alkoholaj kaj senalkoholaj
trinkaĵoj, aliaj agrikulturaj
produktoj;
- importaj deziroj-eblecoj: agri-
kulturaj maŝinoj kaj ekipaĵoj,
rezervaj maŝinpartoj, nutraĵin-
dustria reproduktmaterialoj k.a.;
- rilatoj: kun agrikulturaj kaj
nutraĵindustriaj komercistoj.

41 Koffi Gbeglo

B.P. 13169 Nyékonakpoé
L o m é
Togo

- Kemia teknikisto pri produktado
de trinkaĵoj, makleristo;
- Lingvaj eblecoj: franca, iom
angla;
- Kompetenteco: trinkaĵproduktado,
maklerado, komerca reprezentado;
- Eksportaj deziroj-eblecoj: Lig-
naĵoj, terproduktaĵoj, /kafo, ka-
kao, olivoj, abrikotoj, citronoj/
fiŝoj, industria salo /el Gano/;
- Importaj deziroj-eblecoj: ĉiaj
varoj povantaj interesi triamon-
danojn, precipe nutraĵoj, trinka-
ĵoj, maŝinoj por nutraĵindustrio,
teksaĵoj, uzitaj vestaĵoj, uzitaj
aŭtomobiloj, motorcikloj, bicikloj,
papero, paŭspapero;
- rilatoj: kun entreprenoj deziran-
taj disvendi en Togolando, kun
firmaoj produktantaj trinkaĵojn,
kun eldonistoj.

49 Claudine Dyel

A.Z. Sélection l'Etoile
9, Avenue Charles de Gaulle
F 74200 Thonon les Bains

- Grafologia konsilistino
- Kompetenteco: Priesplori kunla-
borontajn por firmaoj, anoncado,
elekto per psikologiaj ekza-
menoj, konsili al gelernantoj
laŭ iliaj kapabloj.

antaŭ eĉ tiaj kazoj kuŝas ĉiam
interkonsento, baze en la formo
de ne-priskribita kontrakto.

Luprenado kaj ludonado.

Alia speco de kontrakto estas
tio, sub kiu propreco ne pasas de
unu partio al la alia, sed nur
ĝuadrajto, uzadrajto aŭ ekspluat-
adrajto; la propreco ne estas
tuŝata sed restas klare kun la
proprecumanto, kvankam la alia
partio akiras posedrajton en
pli-malpli vasta senco.

Simplaj kazoj estas tiuj de
luprenado de loĝejo, laborejo,
konservejo aŭ remizo, je relative
malta valoro; aliaj kazoj
estas tiuj de luprenado de labor-
ilo, aŭtomobilo aŭ simile, kiam
la tempo-daŭro estas antaŭvideble
tre mallonga; pli longdaŭraj
kazoj estas tiuj de farmbieno,
oficejaro aŭ laborejaro, kiam la
luprenanto rekonas la neceson mem
investi monon por ebligi eksplu-
atadon de la luprenita spaco;
tre ofta kazo estas tio de loĝejo
por familio, kun kvazaŭa garant-
io, ke tiu familio neniel kont-
raŭvole perdos la posedrajton.

Por ĉiuj tiaj kazoj, la Funda-
mento de Esperanto donas al ni la
radikon, lui, kun la difino:
ricevi ion por ĝi ĝin dum difi-
nita tempo, pagante interkonsen-
tantan prezon. Pro la Funda-
menteco de tiu radiko, ne eblas
al ni proponi ŝanĝon en ĝi, sed
ni tamen rajtas opinii, ke dum la
okdek jaroj de ekzisto de la Fun-
damento, aferoj tiel ŝanĝiĝis, ke
almenaŭ tiu radiko estas nun ne
tre oportuna. Sen ia intenco
proponi ŝanĝon en la Fundamento,
ni rekonu, ke estus pli oportune
pensi pri substantiva radiko kun
la signifo: sistemo, sub kiu
posedrajto en io transiras de unu
partio al alia dum difinita tem-
podaŭro, normale sen ŝanĝo en la
propreco de la aĵo. Por tiu
difino ni proponas la terminon,
luo, kaj ni notu, ke tio ne vere
konfliktas kun la gramatiko de
nia lingvo, ĉar substantivigo de
verba radiko donas vorton kun la
signifo, aŭ de ago laŭ la karak-
tero de la verba radiko, aŭ de la
rezulto de tiu ago.

En multaj landoj, simpla luo
okazas sub la skribita leĝaro de
la lando, kiam temas pri loĝejo
simpla. Ne senescepte necesas
formale subskribi kontrakton; la
fakto, ke precumanto ebligas
al luprenanto posedrajton en la
loĝejo, kontraŭ interkonsentita
lupago, estas pruvo, ke kontrakto
ekzistas. Tiam, kiom longe ke
la luprenanto regule kaj ĝusta-
tempe pagas la luprezon, la leĝ-
aro subtenas la posedrajton de
tiu luprenanto, samtempe donante
al tiu luprenanto la rajton eks-
igi el la kontrakto sekve de
taŭga averto al la precumanto;
tiu precumanto kvazaŭ cedas
ĉiun rajton krom, foje, la rajton
plialtigi la luprezon konforme
al la koncernaj reguloj de la
ŝtato.

Lupreno de laborilo, aŭtomob-
ilo aŭ simile, ĉiam okazas sub
subskribita kontrakto. Tiu kon-
trakto klare priskribas ĉiujn
kondiĉojn, inkluzive de la pohora
aŭ potaga luprezon; kutime la
luprenanto devas fari antaŭpagon
de la kalkulebla kosto por la
plena tempodaŭro de la lupreno.

Longdaŭra lupreno sub kontrakto.

Kiam temas pri loĝejo, ofic-
ejo, laborejo aŭ simile, la bazaj
moroj donantaj garantiitan posed-
rajton al la luprenanto spegul-
igas ankaŭ kiam la arango estas
formaligita per subskribita kon-
trakto. Sed ĉar ekzistas en
tiaj kazoj la eblecon interkon-
senti pri aliaj kondiĉoj, estus
oportune krei novan terminon por
distingi ĝin disde simpla luo.

Ni pensu pri sistemo, sub kiu
proprecumanto cedas al luprenanto
posedrajton al io, por difinita
minima tempodaŭro kaj kun rajto
renovigi la kontrakton por plua
tempodaŭro, kaj plue renovigi ĝin
simile, kontraŭ priskribita lu-
prezo, sed lasante al la precu-
manto la rajton proponi ŝanĝ-
itan, (kutime plialtigitan), lu-
prezon, je ĉiu okazo de plilong-
igo de la kontrakto. Por tiu
sistemo ni proponas la terminon,
lisluo.

Ekzistas tiel multaj tiaj kon-
traktoj, ke ne eblas koncize pri-

skribi la normalajn kondiĉojn.

En la kazoj de loĝejoj, la minimuma tempodaŭro ofte estas du jaroj, kaj la tempodaŭro post renovigo simile estas du jaroj; en la kazoj de oficejoj, la minimuma tempodaŭro povas esti eĉ dek jaroj, kaj la tempodaŭro post renovigo kvin aŭ dek jaroj. Oni foje aŭdas pri multe pli longaj tempodaŭroj laŭ kontrakto.

Longdaŭra luprenado de veturiloj aŭ simile.

Apartaj kazoj de lisluo okazas inter entreprenoj. Pro fiskaj avantaĝoj, entreprenoj foje preferas lupreni altvalorajn havaĵojn anstataŭ investi kapitalon tiajn aĵojn aĉeti. Lisluo prezentas solvon, kaj estas ofte uzata por ŝarĝveturiloj, komputoroj, telefoncentraloj, sekurecinstalaĵoj kaj simile. Aparta eco de tiaj kontraktoj estas kondiĉo, ke la luprenanto rajtas proponi anstataŭigon de la koncerna aĵo per pli moderna aparato sekve de teknikaj evoluoj en la aparta kampo, aŭ kiam pli moderna aĵo promesas pli efikan plenumadon de la taskaro.

La proprecumantoj en tiuj ĉi kazoj estas entreprenoj en la formo de financaj instancoj kies sola negocitereno estas tiu ĉi de ludonado; ekzistas arda rivaleco inter ili, kaj ĉiu proponas kondiĉojn laŭ propra takso de la merkato.

Aparta kazo de luprenado kun celo de finfina aĉeto.

Konata aranĝo ŝatata de junaj geedzaj paroj estas tiu de akiro de la daŭraj ekipaĵoj por la hejmo, (meblaro, glaciŝranko, lavmaŝino, televidaparato, ktp), per metodo de regulaj partopagoj dum periodo de, ekzemple, kvar jaroj, je la fino de kiu periodo proprecio en la aĵo transiras al la geedza paro. La kosto de la aranĝo povas esti iom alta, sed la kosto en si mem estas taksata kiel taŭga kompare kun la profitoj spertitaj pro disponebleco de la koncerna aĵo.

Por tiu sistemo ni proponas la

nomon, luprenaĉetado, kaj klarigas, ke la regulaj pagoj konsistas el: luprenkosto, (kutime je avantaĝa tarifo kompare kun simpla lupreno de la aĵo); rentumo pro la ŝuldata sumo, pensante pri la normala vendoprezio de la aĵo, (sed denove je avantaĝa tarifo, kutime), kaj amortizpago, la tuto zorge kalkulita por ebligi, ke je la fino de la interkonsentita periodo, aĉeto de la aĵo okazas per vere modesta kroma pago. La regulaj, egalsumaj pagoj estas konataj al la aĉetonto en la tago de subskribo de la kontrakto; la pagoj kutime okazas laŭ kalendaraĵoj monatoj. Kiel en la kazo de lisluo, la proprecumantoj estas financaj instancoj starigitaj por precize tia komerco.

En estonta eseo, ni diskutos aliajn specojn de akirado.

Lorenc' Mi.

G l o s a r o . . .

engaĝi : vd PIV;

kontraŭpresto: vd IKEV;

proprecio : leĝa, plena kaj propra posedo de io, kun rajto disponi pri ĝi plej absolute;

lulo : difino troviĝas en la teksto;

lisluo : difino troviĝas en la teksto;

luprenaĉetado: sistemo, sub kiu luprenanto pagas, krom la kosto lupreni aĵon, ankaŭ rentumon pro la kosto de la aĵo, sed samtempe grade amortizas la ŝuldatan sumon tiel, ke post antaŭkalkulita tempodaŭro la tuta kosto estas pagita, kaj proprecio en la aĵo transiras al tiu luprenanto, la tuto per serio de regulaj pagoj de egalaj sumoj.

--- o00o ---

Ne-konstatita manko plenigita.

R E C E N Z O .

Terminologia Vortaro; Ak. Rüdiger Eichhdz. Eldonita de Esperanto Press, Kanado, 1986. 50 paĝoj; 29.5 cm.; prezo 4.00 kan.dolaroj. ISBN 0-919186-31-9.

Verŝajne la Esperanto-Movado ne konstatis la mankon de tiu ĉi grava verko, sed nun kun ĝi en la manoj oni povas nur miri pri tio, ke antaŭe ne eblis referenci al tiel nemalhavebla fonto. Ĝi estas, do, provtruduko de Rekomendo 1087 de la Int. Organizaĵo por Normigoj, kun aldonitaj anglaj francaj kaj germanaj terminoj, kune kun traduko de labordokumento proponita de la sama organizaĵo kiel reviziita versio de la Rekomendo 1087 prialdita.

En la ĉefa parto troviĝas 95 difinoj kun la koncernaj terminoj, kaj plej parte kun ekzemploj de uzado; por ĉiuj troviĝas la nacilingvaj terminoj sur kiuj, el la Rekomendo, la traduko estas bazita. En la dua parto troviĝas 106 difinoj kaj terminoj, paralele presitaj kun la angla lingva originalo. Ĉiu difino havas rekonciferon, kaj por la du verkoj kune aperas indekso en alfabeto ordo en la lingvoj, Esperanto, angla, franca kaj germana. (Tiu du lastaj estas malpli longaj ol la aliaj, ĉar la koncernaj terminoj por la dua verko ne haveblas ĝis nun en tiuj lingvoj.)

La tuto disponigas al studentoj kurson en terminologia laboro, laŭ laŭde scienca alirvojo. Kiu konatiĝas jam kun la alta kvalito de publikigaĵoj de la Int. Org. por Normigoj, tiu komprenas sen plia priskribo la meritojn de tiu ĉi verko. La sekcioj: Difinoj; Terminaro; Termino-kreado, kaj Termino-taksado, (en la dua verko), estas aparte valoraj, sed la tuto estas esenca studmaterialo por serioza laboranto en tiu ĉi kampo. Krucreferencoj abundas, kaj la trafikaj ekzemploj de uzado celas forigi

dubojn sed samtempe ebligi proponon de, eble, pli trafa termino. La aŭtoro agnoskas la kreadon de pluraj neologismoj, kaj antaŭvidas reagojn kritikajn pro tio, sed samtempe invitas proponojn de alternativaj terminoj senrezerve.

Aparta merito de tiu ĉi libro estas tio ĉi, ke la koncernaj terminoj, difinoj, ekzemploj, rimarkoj kaj tiel plu estas konservataj en la memoro de komputoro, en la formo de granda, facile pligrandigebla dosieraro; por ĉiu rekoncifero estas datenaro aranĝita en logika maniero. Elpresado de la tuta dosieraro, aŭ de elektitaj partoj de ĝi, ne prezentas problemojn, sed la aŭtoro plej rekomendas intersanĝadon de rimarkoj kaj proponoj per uzado de memordiskoj. Tiaj diskaj pezaj malmulton, kaj kosta malmulte da afranko per poŝto. La aŭtoro elpensis novan nomon, Pekoteko, por la sistemo. Ne: ĝi ne estas ejo en kiu kolekti pekojn, sed akronimo por Per-komputora termino-kolekto. En 11-paĝa suplemento, la sistemo estas plene klarigita, kun evidente sincera alvoko de la aŭtoro al vasta kunlaboro.

Tiu ĉi recenzanto plene rekomendas tiun ĉi verkon; tio ne signifas, ke nenio en ĝi estas kritikinda sed ke la kelkaj malgataĵoj signifas nenion kompare kun la epokfara valoro de la eldonaĵo kiel tuto. Akademiano Eichholz meritas plenan subtenadon de ĉiu serioza uzanto de la internacia lingvo, kaj vastan kunlaboradon de ĉiuj uzantoj al kiuj tia kunlaboro eblas.

Lorenc' Mi.

--- o00o ---

Noto de la recenzanto.

Tiu ĉi recenzita ekzemplero de la verko nun eniras la Bibliotekon de IKEF.

--- o00o ---

REKLAMANONCOJ REKLAMANONCOJ REKLAMANONCOJ

Reklamtarifoj:

Vi volas:

a) por Membroj de IKEF:
unu anonceto ĝis inkluzive
ses linioj: senpage;
por pli longaj anoncetoj:
po 1 respondkupono, (irpk),
por ĉiuj komenciĝantaj ses
linioj de 27 literospacoj.
Ĉiam: unuope mendendaj.

- komerci kun okciden-
ta Afriko, aparte
kun Togolando,
- turismumi en paca
lando de Afriko, no-
me Togolando.

Skribu tuj al
GBEGLO Koffi
B.P. 13169 Nyékonakpoé
L o m é - TOGO

b) por ne-Membroj de IKEF:
po 1 irpk por ĉiu linio, aŭ
por ĉiuj tri milimetroj de
longeco, enkadrigita,
sed kun minimumo de ok
irpk-oj. Ĉiam antaŭpagita.
Por anoncoj je pli granda
larĝeco ol unu kolumno:
laŭ aparta interkonsento.
Ĉiam: tri aperoj de la sama
anonco en sinsekvaj kajeroj
por la prezo de du aperoj.

Kurzo: 1 irpk = 1,00 gld.

fortranĉi

Internacia Komerca kaj
Ekonomia Fakgrupo /IKEF/
Financa sidejo: Visspaan-
straat 97, B 8000
Brugge, Belgio
A L I Ĝ I L O

Per tio ĉi mi/ni petas ali-
ĝon al la Internacia Komer-
ca kaj Ekonomia Fakgrupo
/IKEF/, kiel individua per-
sono/entrepreno/ alia ins-
tanco. Mi/Ni deklaras la in-
tencon subteni la statuton
de IKEF kaj finance kontri-
bui al la mastrumado de la
Fakgrupo.

Nomo, sub kin la membreco elastiĝu.....
Plena poŝtadreso.....
S-ino/F-ino/S-rojaro de naskiĝo/fondiĝo/.....
.....
Profesia okupo kaj agadkampo/j/.....
Maniero de kotizpago
Loko/DatoSubskribo.....